

STARTO



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1975 3(49)



S.K. NEUMANN

en Larikoj

Al de larikoj majkolor',
bano smeralda de verdo
mi la korlecon ĵetis for
kune kun sobro de cerbo.

Kaptis min ega sovaĝa em'
en ĝin ekmergi min tuta;
home ne tremi, sed kiel arb'
sub ventgalopo akuta.

Tiel damnite en plena nud',
Tiel saĝa, freŝa, granda!
Tiel akcepti kun memkompren'
vivon varian, kurantan!

Tuta mi premis min al dekliv',
tra ĝi descendis ĝis fundo,
enradikiĝon atendis mi
branĉojn levonte de grundo.

Flirtis larika tufar' kun muĝ'
super la kapo kun pensoj,
lante eniris en min l'arbar'
enen per ĉiuj homsensoj.

El la poemaro LIBRO DE ARBAROJ,
AKVOJ KAJ DEKLIVOJ tr. J. Kořinek

INTERNACIISTO. SAMIDEANO

La ĉefaj esperantistoj rememoras
la fiero la naskiĝon de la glora
revolucia poeto S.K.N e u m a n n
/5.6.1875/, Nacia Artisto, kies
nomo restos por ĉiam enakribita
en la historio de ilia movado. La
personeco de Neumann estas nedis-
igeble ligita al la Esperantis ta
Klubo en Praha, kies kunfondinto
kaj komitatano en 1902 li estis.

Jam en 1901 li kun simpatio re-
cenzis la Esperanto-lernolibron de
Ĉejka, Bilík kaj Hqub en sia re-
vuo Nova Kulto. Laŭ St. Kamarýt S.
K. Neumann sciis la lingvon en tia
grado, ke en Nova Kulto li pole-
mikis en E-o kun poeto K. Doštal -
Lutinov.

Kvenkam Esperanto estis kelkjara
epizodo en lia vivo, la verkoj de
Neumann, kiel ekz. Anti-Gide, daŭre
elspirados grandan humanisman kaj
internacian patoson, la ideon
pri la unuiĝo de ĉiuj popoloj kon-
traŭ siaj plej grandaj malemikoj -
la ekspluatantoj kaj naciistoj,
por la "emancipado de l'homaro".

/kni/

Okaze de la jubileo

Okaze de la 30a datreveno de la venko super la faŝismo sendis al ĈEA salutojn kaj bondezirojn la Esperanto-Komisiono de la Estona Societo por amikeco kaj kulturaj rilatoj kun eksterlandoj.

La samokazajn salutojn sendis al la asocio Petro Poliŝĉuk, prezidanto de la Esperanto-Komisiono kaj membro de la prezidiumo de Uzbeka Amikeca Societo, delonga amiko de nia lando kaj Dilarom Calalova, prezidantino de la Esperanto-Klubo ĉe Taŝkenta Domo de Sciencistoj. Niajn anojn salutis ankaŭ la Komisiono pri internaciaj rilatoj de latviaj esperantistoj, la Riga Esperanto-Klubo, EK el Leningrado, la Esperantista Societo "Kulturo" el Plovdiv kaj D. Bjeļanoviĉ, la MEM-peranto por Jugoslavio.

Bondeziroj al Vjetnamio

Ĉefa Esperanto-Asocio kaj ties MEM-sekcio sendis gratuleton al Vjetnama Pacedefenda Esperantista Asocio okaze de la epokofara venko de la vjetnamaj patriotoj, dezirante al la vjetnamaj fratuloj la pluajn sukcesojn sur ilia paco vojo.

Simila letero estis adresita ankaŭ al la ambasado de Sudvjetnama Respubliko en Praha.

Kiel ni estis informitaj, la Vjetnama-sovjeta amikeca societo estis honorita per Ordeno de la Amikeco de la nacioj. Al la societo, kies prezidanto estas Nguyen van Kinh, estro de VPEA, gratulis perletere la ĝen. sekretario de KPSU, Leonid Breĵnev. Ni esprimas niajn plaĵkorajn bondezirojn!

FESTO EN BUDAPEŬTO

La solenan kunsidon de Hungara Esperanto-Asocio la 20an de aprilo en Budapeŝto rememore al la 30a datreveno de la liberigo fare de la Ruĝa armeo partoprenis delegito de ĈEA J. Mařík. En sia alparolo li bondeziris al la grava jubileo, kaj menciis iujn komunajn faktojn en la laboro de ambaŭ landaj movadoj kion la ĉeestantoj verne aprezis.

La eksterlandaj delegitoj /Bulgario, ĈSR, GDR, Pollando kaj SSR/ vizitis i.a. la tombon de Julio Baghy en la tombaro de gloraj hungaroj kaj partoprenis tre viglan, diskuton en la entrepreno TESCO /Teknika kaj scienca kooperado kun ĝia direktoro M. Gyorgy kaj studentoj el Bangladeŝo kaj Kamboĝo. La diskuto okazis en IL, instruata en TESCO. La direktoro substrekis ĉe fine la gravan signifon de IL en plenumado de la taskoj de internacia kunlaboro kaj atentigis, ke en TESCO edukigaŝas la estontaj laborantoj por IL en la evolulandoj.

La delegitoj notis modelan gastamon de HEA dum la tuta restado.

Ze zasedání ÚV ĈES

Na posledním zasedání ÚV ĈES, konaném 12. dubna, vyzval tajemník ÚV Z. Křimský všechny místní skupiny v svazu k politické a společenské aktivizaci v souvislosti s 30. výročím osvobození a s novými úkoly na ideologické frontě. Poukázal přitom na některé škodlivé názory a postoje členů a funkcionářů ĈES, na nevhodné způsoby propagace esperanta a konstatoval, že je třeba prohloubit centrální řízení MS na principech vědeckého řízení.

Předseda svazu J. Vlček poté informoval o 7. setkání představitelů esp. svazů socialistických zemí v Mělníku. Řekl mj., že schůzka přispěla k vyjasnění podmínek esperantského hnutí v těchto zemích a že v socialistických zemích má toto hnutí příznivé podmínky.

Dr. J. Jermář, člen předsednictva ÚV ĈES, referoval o významu problematiky komunikace a mezinárodního jazyka v SSSR a o možnostech příslušné komise zřízené při ĈES.

ÚV ĈES schválil mj. návrh na udělení 15 čestných odznaků MEM za sloužilým pracovníkům svazu, včetně některým funkcionářům z řad neesperantistů. Vyznamenání jim budou předána u příležitosti II. setkání českých a slovenských esperantistů ve Vsetíně /19.-22.9./

LA KVINMINUTAN ELSENDON pri LG en Plzeň oni povis spekti en la Ĉs. televido la 5an de junio. - Simila ero pri la lerneja ER de E. Urbanová estas prezentota la 4.9.

JAZYK - společenský činitel

Jsme teoreticky připraveni na řešení úkolů?

Každodenně jsme svědky provádění a přehodnocování dosažených po-
znatků a zkušeností. Nutí k tomu převratný vývoj ve všech oblastech ži-
vota. Současně vzrůstá potřeba aplikovat nové poznatky v praxi.

Popularizátoři mezinárodního jazyka esperanta si někdy nedostatečně
uvědomují tyto skutečnosti nebo je nedůsledně uplatňují v praktické
činnosti. Nedostatečná teoretická připravenost bývá jednou z hlavních
příčin konfliktů, které svědčí o nepochopení objektivních zákonitostí,
s nimiž je nutno sladit potřeby a cíle esperantského hnutí. Sezná-
movat s esperantem a jeho problematikou totiž zdaleka neznamená toliko
vyučovat gramatiku, případně historii a literaturu jazyka.

Potřeba ukázat problematiku esperanta v celé její šíři je zvlášť na-
léhavá, mluvíme-li o získávání mladé generace. Prezentovat mladým lí-
dem esperanto jen jako prostředek turistiky a zábavy a ne jako součást
vědeckého poznání je p r e c e d e n s sektářského přístupu k esperan-
tu.

Výraznou stránkou problematiky mezinárodního jazyka, bohužel doceňo-
vanou málo v esp. tisku, je právě jeho s o c i á l n í aspekt. V do-
bě, kdy se myšlenky socialismu realizovaly na velké části světa a nový
společenský řád se stal rozhodujícím faktorem v řešení problémů v me-
zinárodních vztazích, se dostává i problematika esperanta rozdílného
výkladu - a to z hlediska třídního pojetí. Úspěchy esperantského hnu-
tí v socialistických zemích zpochybnily do značné míry koncepti n e u -
t r a l i t y, kterou prosazují ti, kdož z pozic výlučné politických
se snaží "ubránit" esperanto před vlivem socialistických idejí.

Perspektivy esperanta jsou ve službě společenskému pokroku. Pomáhá-
-li esperanto popularizovat cíle socialistické společnosti, zvěštuje i
základnu svého působení, což je nejlepší zárukou jeho masového rozší-
ření. Potvrzením správnosti této cesty bylo vytvoření a dvadecetileté
působení M.E.M.

Esperantisté by si měli především odpovědět na otázku, zda dosavadní
formy činnosti jejich místních skupin odpovídají nárokům, které si kla-
de esperantské hnutí. Velký úkol ve vědeckém, ideovém a osvětovém pō-
sobení tu připadá také příslušným svazovým sekcím a komisím.

Naše hnutí bude i v budoucnosti potřebovat materiální a morální pod-
poru vlivných organizací a jednotlivců. Je však rovněž důležité, aby sa-
mi esperantisté se angažovali v těchto organizacích, aby dovedli zdů-
vodnit na všech úrovních potřebu mezinárodního jazyka v konkrétních pō-
mínkách. K tomu si nezbytně musejí rozšířit také obzor svých odborných
a všeobecných znalostí.

/Kni/

Resumo : temas ĉefe pri la socia kaj sociala aspektoj de E-o, ĝenerale malatentata, pri ĝia diskoniĝo kaj pri la neceso plialtigi la teori-an nivelon tiurilate inter la esperantistoj.

Sjezd ZE SSR po šesté


Ve dnech 25. - 27. dubna zasedal v Tetranské Lounici 6. sjezd Zvázu esperantistov SSR. Za ĆES pozdravil přítomné místopředseda ÚV ĆES a.D. Kočvara. Předseda ZE SSR P.Rosa uvedl ve své zprávě, že již v příjmuza-
hájí Slovenské televize vysílání kurzu E-a. Svaz, který má nyní 675 členů, vytvoří na území SSR krajské a podle potřeby okresní výbory.

Zprávy ze sekci podali dr.L.Izák /lékař/ a M.Rybin /pošt.zam./Schůzi sekce MEM a zasedání sjezdu řídil dr.F.Natura. Přes 100 účastníků - mezi nimi i polská výprava - bylo přítomno polození věnoů k Pomníku pat-
lých ve St.Smokovci, kde promluvil D.Papák.

Na závěr sjezdu vystoupilo loutkové divadlo z Košic. Po představení bylo sjezdové vlajka předána bratislavským esperantistům.

/dk/

NIA KONTRIBUO AL INTERNACIA VIRINA JARO



VIRINOJ EN ĈS. ESPERANTO-MOVADO

de JAROSLAV MAŘÍK

Unue, enkonduka klarigo : kial viro pritraktas tiun temon ŝajne pure virinan ? Antaŭ monatoj mi, nesingarde, sugestis al nia redaktoro publikigi mian rememoron pri majstrinoj de Esperantolokventeco. La redaktoro insistis antaŭ la Tago de Virinoj, sed la dato pasis... kaj venis Emilija Lapenna en Heroldo de E./7/1975/ kun "Relative multaj elstaris"-resumo pri virinoj en la E-movado. En ĝi sole du ĉefaj esperantistinoj estas menciataj / Šupichová kaj Urbanová/. Tio inspiris min klostre min fermi disde la mondo por pluraj tagoj. Mi studis mian arĥivon, la Enciklopedion, lamanuskriptan historion de D-ro S.Kamaryt /sole p.1-30 alireblaj!/, Skizon pri la E.-literaturo /Novobilský/, komitatano-listojn en "Esperantista" /1946-51/, E.-movado en Moravio /Mastrý/, E., jeho vývoj a význam pro nár. školu kaj Rádece českého esperantisty /J. Šupichová/, E.-literaturo /Koronzczy/, Gvidlibro...-Skizo de E-a Literaturhistorio /Kalocsay k.a./, iom el Historio de E./Privat, I-II/, Resuma hist. de la E.-movado:Junularo /Mařík/ k.a. Inter la "k.a." estas ankaŭ - mia historia trovaĵo! - la kajero Z1948 de la /bele presita/ bulteno "Esperanto" de EK Hradec Králové, en kiu J.Šupichová antaŭiris je 27 jaroj E.Lapenna-n per sia trakta-to dupaĝa "Ženy v esperantském hnutí". Sed ankaŭ ŝi mencias sole tri ĉefinojn: Krausová, Studničková kaj Tesařová.

Kaj jen estas la rezulto de mia "klostre enfermiĝo". Povas esti ke malgraŭ la serĉklopodo mi tamen /ĉefe pro la mallonga liver-templimo/ iun menciindan virinon preteratentis. Eble iu el la legantoj povas kompletigi la kolekton ?

Enkonduke, estu menciataj kelkaj virinoj el la komenco de la Movado, sensalfabete. La ceteraj sekvas laŭalfabete. Post ili sekvas kelkaj laŭtemaj nomaroj.

Unu el la unuaj ĉefaj esperantistinoj, kun B.Krapková-Raichlová, estis s-ino H á j k o v á. Ŝi lernis Esperanton en kurso /1889-1890/ gvidatan en Praha persone de F.V.Lorenc /poste Lorenz/, aŭtoro de la 1-a lernolibro. Kun ŝi la kurson vizitis ankaŭ ŝia sepjara fileto František, la poste konata laborista esperantisto kaj rubrik-gvidanto en la ĝeneva "Esperanto". - Ĉar Kamaryt konkludas, ke Raichlová estas la unusola Esperantistino, kiu restis el la tiamaĵ tempoj, ni povas kun certeco opinii, ke Hájková kaj Krapková-R. estis la unuaj ĉefaj esperantistinoj. /Pri Hájková mi scias el korespondaĵo de Hájek; la leteron dro Kamaryt ne konis./

Bá la Krapková - Raichlová /1871-1951/, instruistino, koneta revoluciulino, membrino de Omladina /persekutita de la aŭstra monarĥio-reĝimo/, amikino de red. Josef Škíba kaj F.V.Lorenc /ankaŭ Omladina-ano/, kiu instruis al ŝi kaj al aliaj junaj socialistoj

"U Pátrosá" /Pátrosova ulice, nun Praha 1/ unue volapük-on, poste /1889-1890/ Esperanton - en la unua kurso de Esperanto por ĉeĥoj! Laŭ peto de Škába ŝi ĉefigis la jam faman kanton de polaj revoluciuloj "Ruĝa standardo" /Rudý prapor/ tiel bone, ke ĝi poste estis ofte kaj entuziasme kantata sen tekstosango /malgraŭ la risko je 3-4jara aŭstria karceraro/. Ĝian tradukon Esperantan /vidu en "Esperantista" 5/1951/ eldonis en 1912 F. J. Chaloupecký en "Laborista internacia kantaro" /pri la dato eraris Radio Praha en sia elsendo pri revoluciaj kantoj, 4.II.1972/. Hel.Malifová uzis la kanton en sia teatraĵo Bratrství /1905/ kaj la rakonto de B. Raichlová "La elspirita feliĉo" /"La progreso", majo 1908/ ŝi utiligis en sia romano "Právo na štěstí" /laŭ opinio de F.Hájek/. Pri Raichlové skribis d-ro F.Soukup en "Revoluce práce" p. 536/ kaj d-ro M.Volf : "Ne-še dělnické hnutí v minulosti".

Fidela laborantino en la Esperanto-movado kaj same fidela batalantino por socialisma sociordo. "Nia esperantista Prapatrino" - tiel nomas ŝin Fr.Hájek en siaj rememoroj /en letero al EKP 17.8.1961/.

F - i - n - o H a i n t h a l o v á , kunfondinto de la Esperantista Klubo en Praha. Ŝi sidis la 9an de dec.1902 ĉe unu tablo kun la fama proleta poeto S.K.Neumann, posta Nacia Artisto de ĈSR, fondante, kun 13 ceteraj personoj, la EKP, en la gastejo " U Štajgrů " /nun la palaco U Nováků/. Ŝi estis elektita kiel anstataŭantino en la komitato de EKP, en kiu Neumann ferigis komitatano.

Aktivulinoj en la unuaj jaroj de EKP estis f-inoj Anna Bernardová, Betty Vaníčková, Božava Vaníčková kaj s-ino Pittrová. Plaĉe multobligita afiŝo de la " Unua virina bohema grupo esperantista " invitis al "Amuza vespereto" 11.II.1909, en kiu kantis, deklamis kaj aktoris la virinoj: Reissová, Zápotocká, Krausová, Šmídová, Vaníčková kaj aŭtoris B. Studničková kaj Tesářová. "Aĝrable rememori ilin...: Ĉiuj estis bonaj, ĉar ilia koro brilis por bona afero" /Kamarýt/.

A d a m c o v á M a r i e /en Brno/, aktiva sur organiza kaj klub-programa kampoj.

B a l d o v á M a r i e , komitatano de EA ĈSR, poste ĝia sinofera oficistino,

B a r e š o v á A d é l a /mortis 1951/, poŝta oficistino, multjara aktiva laborantino en EKP.

B á r o c h o v á A n n a /1894-1975/, unu el la plej konataj ĉefaj esperantistinoj kaj unu el la kolonoj de la E.-movado en ĈSR. Esperantistino de 1922, deure vigla komitatano /kasistino/ de EK Praha kaj senlaca ekspedantino de ĝia Bulteno. Komitatano de EAĈSR. Zorgema "panjo" por vojaĝantaj esperantistoj. Ŝia loĝejo estis vivoplena per telefona informejo por Praha /kaj ne nur por ĝi/. Ŝi gvidis kursojn por nevidantoj, partoprenis sep UK, plejparte en nacia kostumo kaj kiel blindul-gvidanto. Virino absolute sindona al IL kaj ĝia ideo. Distingoj: Honora diplomo de Kleriga Instituto-ĈSEK /1965/; jubilea honora insigno MEM/1973/ honora membreco en ĈEA /1969/. /Ŝi meritis memstaran ĉapitron!/,

B a r t o v s k á M. Longatempе aktiva sur kampoj organiza, prilingva, tekstortara. /En PIV citita kiel kunlaborantino/. /Fryček-Místek/.

B e n d o v á J u l i a n a . Kursgvidantino en Praha, prelegantino en EKP.

B o h á ĉ o v á V l a s t a . Komitatano kaj protokolistino de EKP.

B o r s k á V ě r a /Brno/, opera kantistino, konatiĝis per siaj kontribuoj en kanto-koncertoj.

C í c h o v á - H r d l i ĉ k o v á J a n a /1923/ diskonigis per sia tradukado de la ĉefa literaturo, plej ofte en "Oomoto" /Jap./, aŭtorino de esp.poeemoj. Esperanta parolistino en poraŭstria elsendoj de Radio Praha, gvidis virinan komisionon de ĈSEK, redaktis "Verkista bulteno" /ĈSEK/, ekzamenita esp. gvidistino en Praha.

D a n d o v á L u d m i l a , esperantistino de 1914, laboris sur gvidposteno en katolikaj E-rondoj, redaktis "Informilon", gvidis kursojn/P/D l o u h á S i d o n i e , sekretariino de la Rondeto de Esperantistinoj en Praha /post la I-a mondmilito/,helpadis al J.Supichová. G o b e l o v á H e d v i k a , librotenistino de EAĈSR. G r o s s m a n n o v á V a m b e r o v á A n t o n i e /1896-/,fidela kaj laborema esperantistino dum jardekoj en L.Bohdaneč. H a v r á n k o v á - H a r t m a n o v á M a r i e realigis prelegkaj muzik-vojaĝojn pri ĈSR en Nederlando. H e j n o v á A n n a /1895-/,fidela kunlaborantino kaj dum jaroj eĉ la flegistino de Julie Supichová. Tradukantino ne nur el E. /ekz.la romano Antau du mil jaroj/, sed ankaŭ el la germana en Esperanto.Esperantigis monografion de D-ro Votrubec pri D-ro Albert Schweitzer.Ordigis la postlasaĵojn de Supichová kaj transportis al Ĉerv.Kostelec. H o l á - J e n a s s o n J i ř i n a . Funkciulino de EK Praha,nun vivanta en Svedlando. Ĉenigis el la sveda vojaĝlibron,eldonitan en Praha. C h l u b n o v á D r a h o m í r a aktivis inter la junularoj en Brno, kursgvidantino, regiona perantino de E.-Junularo en ĈSR, ankaŭ ĝia kultura kaj lingva delegito, bona deklamantino. Vickomitantino de EAĈSR. J a k u b c o v á M i l d a /1889-/. Latvino edziniĝinta en ĈSR/Brno/sutorino de spritaj kaj farase gajaj versoj en multaj gazetoj,iama sekretariino de Latvia Esp-ista Asocio kaj ekaprezidantino de loka grupo Brno-Židenice, kursgvidantino, kunlaborantino de "Ondo de Daugava"/Riga/kaj "Esperantisto slovaka". Aŭtorino de "Estrado de animaloj",originala versita kolekto de 100 fabeloj /1970/. J o s k o v á M i l a d a , komitatanino de EKP, kursgvidantino, ankaŭ en Hungario, aktive en la MEM-movado, membrino de ĝia internacia komitato. Honorita per jubilea MEM-insigno. J u ř e n o v á M i r o s l e v a , komitatanino de EKP, gvidis modelan lernejan E-rondeton, kiu brile prezentis sin dum la 70-jara jubileo de EKP. K e y z l e r o v á B e r t a , prezidantino de "Esperanta unuiĝo";fondita de J.Supichová en Ĉerv.Kostelec. "Reĝino" en la teatraĵo "Nokto en Karlův Týn" dum la UK 1921 en Praha. K l e g o v á L y d i e iniciatis la estigon de aparte kaj sekve intencita junulara vivo en Ostrava,/fine de la 40-jaroj/, kiu pretendas esti la lulilo de la postmilita, nekutime aktiva junulara movado en nia lando;kun ŝi fervore aktivis ankaŭ V ě r a S u k a ĉ o v á. Profesia laborantino de ĈEA. K o n o p o v á A n ĉ i , en Praha, aktive disvastigis Esperanton, sukcesis en kolektado de eminentulaj subskriboj por UNESKO. K r a s s o v á M a t y l d a , edzino de la dua prezidanto de EK Praha /Vojtěch Kraus/, gvidantino kaj animo de la Unua Virina Grupo Esp-ista. "Eksterseria sciantino de la lingvo, al kiu ŝi, sciante de pluraj lingvoj, dediĉis sin kun vireca seriozo" /Kamarýt/. Respektata kaj helpema en ĉiu laboro. La "Lingvo internacia",jark.1910, raportante sur p.ĝ. 328 pri jarkunveno de la Grupo, citas ŝin kiel sekretariinon kaj E.Studničková kiel prezidantinon. Aktive kunlaboris en multaj aliaj esperantistaj entreprenoj. L i š k o v á R ů ž e n a . Ankaŭ virinon, kiu sukcesis transvivi la furiozon de la Teutono en L i d i c e , ni havis inter ni:Růžena Lišková. Entuziasma esperantistino same kiel s-ro Jar.Vyžvalda, kun kiu ŝi konatiĝis en la Somera E.-Kolegio en Doksy /1948/. "Esperanto kunigis min por ĉiam", ŝi skribis en sia prelego por Radio Praha, en kiu ŝi ankaŭ vokis la esperantistojn "Kuniĝu kontraŭ nova milito, same kiel ni kuniĝis en la koncentrejoj!" L o r k o v á M a r t a , program-aktiva,precipe en la Brno-Junularo. M i č o v á J a r o s l a v a /1921-1973/,estinta komitatanino de EAĈSR aktiva en specialaj taskoj, ekz.sukcesa kolektado de subskriboj de eminentuloj al UN aŭ al la Komitato por la Nobel-premioj. /Daurigota/

RONDETA VIVO

B R N O - Inter la 12.-27.5 estis modele aranĝita en du grandaj vitrinoj de la Universitata Biblioteko en Brno ekspozicio pri la rusa kaj soveta literaturoj en Esperanto. Vigla intereso ĉe la studentaro kaj vizitantoj de la biblioteko. Post la finigo de la supre menciita ekspozicio estis instalita en la sama biblioteko k en unu granda vitrino ekspozicio de la vjetnama literaturo en E-o kiel daŭrigo.

La 20.^a aranĝis la klubo vesperon de poezio sub la titolo "Al mia lando mi kantas", rememore al la 30a datreveno de liberigo de nia patrio kaj atingo de la paco. Recitis Eva Seemannová el Praha.

O P A V A - Vigla junulara grupo de LG ĈEA preparis honore al la liberiga datreveno duonhoran ĉeflingvan programon, kies ĉefan parton konsistigas la rusa popola fabelo "La ruza kamparisto", en kiu rolas 11 personoj inkluzive infanojn sub la gvido de J. Hoblíková. Nun oni preparas la saman programon en E-o por prezenti ĝin al la esperantista publiko. /vk/

O S T R A V A - Esperanto en la servo de paco nomiĝas ekspozicio malfermita la 11.6. en la Societa domo de VŽKG. La aranĝo estas omago al la 30a datreveno.

P A S K O V - La kluba kunveno /14.4./ rekomendis al ĉiuj LG-membroj plenumi 30 libervolajn laborhorojn okaze de la liberigo - datreveno. La novan 7mbran komitaton de la grupo estras F. Křístek kiel prezidanto.

P R A H A - La ĉefurbaĵ esperantistoj sendis de sia kunveno la 7an de aprilo rezolucion al Ĉefa Paĉkonsilio, en kiu oni bilancas la tridekjaran aktivecon de la Klubo por la subteno de la porpacaj klopodoj kaj por la amikecaj rilatoj inter la popoloj.

Laŭ raporto de A. Zmeškal dum la

jarkunveno la Biblioteko de J. Šustr de la EKP havis en marto 1975 jam 5 798 titolojn /inkl. de kompletaj gazet-jarkolektoj/. En marto 1970 ĝi posedis 4696, do la alkranko dum la kvin jaroj estas 1102 titoloj /jm/

S E M I L Y - La 14an de junio okazis la jam tradicia renkontiĝo de naturamikoj en Bozkov. Preskau 40 esperantistoj kolektiĝis ĉe la kafeo "Ĉe malnova lampo" - post marŝo tra la valoj de riveroj Jizera kaj Kamenice, trarigardinte gutŝtonajn grotajn en la ĉirkaŭaĵo. Kantado, rostando de kolbasoj kaj gustumado de la ĉefa biero ege impresis la gastojn el CDR. /max/

T E P L I C E - Inter la vespero j menciindaj en 1975 estas ekz. tiuj pri S.K. Neumann, pri la "interbrigadoj" en Hispanio kaj ekspozicio je la temo ĈSR per la okuloj de niaj korespondamikoj.

Z N O J M O - Amuzvesperon de LG kun recitado, ludoj, konkursoj kaj kantoj partoprenis la 12an de junio ankaŭ la novaj Esp. adeptoj, kiuj en septembro frekventis la kurson.

Vespero dediĉita al la mortotago de Zamenhof okazis la 14an de aprilo. Partoprenis precipe gejunuloj.

Konkurso sen premiitoj

Nia proklamo pri la traduka konkurso en prozo renkontis nur moderan eŝon kaj la malmultnombraj kontribuantoj ricevitaj ne donas eblecon fari ian konkludon, nome atribui la premiojn al la partoprenintoj. Ni tamen plu alvokas ĉiujn kapablulojn, ke ili laŭ siaj eblecoj provadu esperantigon de la novtempaj ĉefaj aŭtoroj, precipe la prozaĵoj, kiuj per siaj verkoj esence riĉigis la ĉefan literaturon /ekz. Olbracht, Vančura, Pujmanová, Rezáč, Fuchs k. aliaj/.



KRONIKO

Anna B á r o c h o v á /1894-1975 honora membrino de ĈEA, portantino de Honor-Insigno de MEM, longjara kasistino de EK Praha, fervorega laborantino de la movado, forpasis la 26an de aprilo 1975. Ŝi estis virino de nekutimaj energio kaj obstino por la afero, pro siaj homtrajtoj respektata de ĉiuj. En j.1922, post la XIII-a UK en Praha, komenciis ŝia laboro por E-o neniam interrompita dum 54 jaroj. Anna Bárochová senrezerve kaj modeste aktivis, efike subtenante la asocian bazon en la ĉefurbo.

La 2an de majo adiaŭis la karmoran forpasintino en la kremaciejo Strašnice per alparoloj de R. Horský por EKP, J. Vítek, prezidanto de ĈEA kaj multnombraj membroj de EKP.

Inĝ. Eduard F e l i x, membro de nia redakcia komitato, mortis 19an de majo 1975, estante 75jars. Dum sia vivo li estis pioniro de aviado, konstruisto, organizanto en la industrio, verkisto, lingvo-instrumento. Esperantisto de ĉ. 15 jaroj, li baldaŭ ekregis la lingvon kaj konstruis ĝin en la SET. Li kunlaboris en la Lingva komisiono de ĈEA kaj lastatempe gvidis ĝin. Kunaŭtoro de karate terminologio en E-o. La ĈK ĈEA nomis lin en 1974 sia honora membro. - Trideko da samideanoj adiaŭis al inĝ. Felix 23.5., inter ili J. Vítek per sia adiaŭa parolo.

Sian 60jariĝon ĝisvivis la 12an de marto Adolf S t a n u r a, fakulo pri la Esperanto-stenografio, kaj tradukisto.

La 70jaren vivjubileon festis la 3an de junio Antonín S l a n i n a longjara funkciulo de EK Praha, reĝisoro de la Verda Stacio kaj konata instruisto de Esperanto, precipe en SEK Dokaj, redaktanto de "Verda Voĉo de Dokaj".

Promociiĝis la 4an de majo inĝ. Ladislav K a n i o g a el Praha. Al ĉiuj sinceran gratulon!

ORA JUBILEO. En 1975 plenumiĝis 50 jaroj de la esperantisteco de Aleš B e r k a, vicprezidanto de la ĉefa MEM-sekcio kaj de longjara prezidanto de EK Vsetín. Li iniciatis kaj gvidis ĉ.100 Esp.-kursojn, inter ki-

uj elstaras tiu en 1940 - tiujare la ununura dum la mondmilito. Aleš Berka estis fondinto de la tn. Eldonejo de malkaraj libroj, el kiu eliris tuta vico da diversaj aŭtoroj, ankaŭ la verkoj de la eldonanto. Precipe la libroj - ilia eldonado kaj disvendado - fariĝis la esperantista destino de la jubileanto.

ROBUSTONDI

deziras

USSR - Klubo de la internacia amikeco /Stepanova Irina/ 660 075, Krasnojarsk, pk 2420, KTD, E-sekcio. o Miŝenko Sergej kun 4 esperantistoj 16-17jaragaj el Zaporoge, Malinovskogo 4-49, 330059 o Bajkova Alja, 446026, Kujbyŝevskaja obl, Syzranj, Moskovskaja d.10, kv.14 o A. Vajsberg, Murmanskaja obl.184280 - Monĉegorsk, abonkesto 53 o J. Lupickij, 40j. tradukisto, 310072 Arkavo, str.23 Aŭgusto 62-127. Kun samfakuloj. N. Dolganova 24j. studentino de muziklernejo, Syzranj, Kujbyŝevskaja obl., str. Gogolja 12-7 o G. Berezin 340048, Doneck-48, pk 308

RUMANIO - 13 gestudentoj pri filologio 21-22j /Camin Studentesc Arini, Suceava 6/ o f-ino Timofte Dorina, bul. 1 Mai 21, pediatrie cam 16, stud. pri medicino, Suceava 6.

BULGARIO - Lernantinoj D. Stefanova, ul. S. Kostov 30, S. Andreeva, ul. M. Nikolov 47 kaj S. Ivanova, ul. M. Nikolov 30, ĉiuj el Popovo 7800 o L. Ivanova 31j. juristino, 5000 Veliko Trnovo, Tolbuŝin 13.

POLLANDO - Stanislaw Machowski, PL 56412 Borowa ol.68 woj. Wrocław o Maria Fuz 23j. studentino, 4F-300 Mysa, str.1. Maja 11m.1 o Zbig. Sidor 85-319 Bydgoszcz, ul. P. Pindava 289 o A. Myszakowski 31j. juristo, str. W. Curie Skłodowskiej 5 b/9, 56-400 Oleśnica.

HUNGARIO - Kiss Mihály, 5700 Gyula Szent László út.1 o Hajdú Károly, 5700 Gyula, Pást út. 1. Ambudgerlernojoj.

ĈSSR - Prospektojn kolektas Iva Nezhybová, Pražské 291, 41155 Tezevín.

Je lingva temo: _____

LA POPOLA KARAKTERO DE ESPERANTO

La lingvoj, same kiel la nacioj, vivtenas kaj konservas sin nur per tiuj ideoj, idealoj kaj konceptoj, kiuj iam naskis, nutris, knedis kaj estigis ilin. La idealo, la interna ideo de Esperanto estas profunde demokrata. Sekve de tio ankaŭ la spirito de Esperanto estas intime popola, popola en la plej vasta senco de la vorto. Nur tial al la tuta sistemo de Esperanto kvazaŭ disradias ia preskaŭ inĝeniera prudento de ordinaraj, simplaj, saĝaj kaj praktikaj homoj, tiu tipa realismo de la uloj, kiuj kutimas krei kaj labori. Sed ĝuste pro tio en Esperanto ne estas loko por ĥimeroj! Kaj same tial ĉio en ĝi / almenaŭ en la Zamenhofa Esperanto / estas kristale klara, simpla, skema, racia, sistema, logika, analogia, senescepta kaj belgusta.

La spirito de Esperanto nepre ne estas vulgara. Sed ĝi, ankaŭ, ne estas dokta. Esperanto estas lingvo de la "ora meza vojo". Kaj tial, iasence, ĝi estas pli lingvo de ia gimnazia bando, ol lingvo de la tradiciaj profesoroj. Ĉar tiu gimnazia bando scias sufiĉe multe, sed feliĉe, ĝi ne scias tro multe. Ĉarte, ekzistas eĉ "lucidaj" spiritoj kaj artistoj kiel Lapenna, Waringhien, Régulo, Rossetti, Auld, Neergaard kaj aliaj, kiuj komprenas ke, kreante artaĵon, ili devas forgesi, kion ili scias, kaj kiuj scias, ke same estas eĉ pri Esperanto, kiu, en ia mistera senco, estas pli afero de amatoroj ol demando de doktoroj. Ĉar ankaŭ Zamenhof estis nenio alia ol genia amatoro!

Bedeŭrinde, lastatampe tiu "popola", "katolika" karaktero de Esperanto / tiun "katolika" komprenu en ĝia greka senco! / estas ĉiam pli kaj pli minacata. La Zamenhofa Esperanto estis lingvo de ĉiuj. Nun ne estas plu certe ĉu ĝi ne iĝos nur lingvo de iuj!

La amatoroj estis sufiĉe simplaj por voli ruro kaj rura aŭ sekso kaj seksa, polui kaj poluo, intenso kaj intensa, halucino kaj halucini, perverso kaj perversa. Ili ne estis sufiĉe eruditaj por voli ruro kaj rustika, sekso kaj seksuala, polui kaj polucio, intenso kaj intensiva, perverso kaj perversia, halucini kaj halucinacio, respektive, krome, seksologio kaj seksuologio. Ĉar sur ĉi tiu vojo ili vidis nur la finon de Esperanto kaj ĉio. Ili estis konvinkitaj, ke eĉ dek mil novaj neologismoj ne povas endanĝerigi Esperanton. Ili timis ke, kontraŭe, tiuj daŭraj, silentaj, iompostiomaj, kaŝaj kaj preskaŭ nerimarkataj ŝanĝoj, modifoj, "pliriciĝoj" kaj "korrektoj" de ĝia strukturo, tiuj aliigoj, kiuj ĉiam okazas, povus konduki Esperanton nur tien, kien ili kondukis jam Volapikon, Idon, Okcidentalon kaj la aliajn?!

La spirito de Esperanto estas genie amatora, ore mezvoja, progresema kaj moderna, altgrade inĝeniera, geometria kaj simpla, prudente utilisma kaj pragmata, kaj preskaŭ supere praktika.

